



Esperanto 80

# Okdek-anoj Ĉe l' Papero

Nova eldono 2004 • n-ro 12a

La gazeto de la membroj de l' asocio Esperanto 80

Decembro – Décembre 2004

Le journal des membres de l'association Esperanto 80

**Annonces importantes!  
Atentu! Gravaj anoncoj!**

## Réunion Conviviale – Gasta kunveno

**N'oubliez pas de venir**

à la réunion conviviale qui aura lieu :

**le Vendredi 3 décembre 2004 dès 19h30, salle des Tilleuls à Salouël (derrière la Mairie).**

Surtout n'oubliez pas, si vous souhaitez participer au repas qui aura lieu ce soir-là, de téléphoner à Daniel au 03 22 47 30 11 avant le mercredi 1<sup>er</sup> décembre 2004 au soir.

**Une A-G Extraordinaire aura lieu ce jour-là, à la fois pour que des décisions importantes soient prises (voir page 3 et ci-dessous).**



## Événements en pagaille... Eventoj sinsekvaj...

Nuntempe, multaj eventoj okazas nun en la asocio. Eventoj sin sekvas, sed ne similas unu la alian, kaj eĉ montriĝas kontraŭaj.

La propono sin registri en la renovigitan tuton de la Norda Federacio — iel pozitiva kaj vigliga —, kaj la elekto far Jean-Claude ekŝiĝi de la posteno de prezidanto de la asocio — iel negativa kaj malkuraĝiga —, nin devigas pridiskuti la funkcion de la asocio.

Decidojn oni faru, kaj pro tio oni asignos okaze de la venonta gasta kunveno la membrojn por Eksterordinara Ĝenerala Kunveno la 3an de decembro 2004.

Tiuj decidoj havos eble gravajn konsekvencojn pri la vivo de la asocio, sed espereble ne-vivesencaj pri ĝi estonto.

Esperanto 80 sidas je turnopunkto de ĝia ekzistado, sed ni estu optimistaj, la punktoj, per kiuj mi parolis al vi estu modorigendaj. Ekzemple, ni, punkto post punkto, ekstraktu la avantaĝojn kaj la malavantaĝojn pri registro aŭ ne-registro al la Federacio. Simile, la disponigo de la posteno de prezidanto far Jean-Claude ne estu konsiderata laŭ drama vidpunkto. Mi trankviligu vin: Jean-Claude ne decidis forlasi la asocion.

Il se passe beaucoup de choses en ce moment dans l'association. Les événements se suivent mais ne se ressemblent pas et se montrent même contradictoires.

La proposition de s'inscrire dans l'ensemble renouvelé de la Fédération Nord — plutôt positif et dynamisant —, et le choix de Jean-Claude de prendre du recul en donnant sa démission du poste de président — plutôt négatif et décourageant —, nous obligent à remettre en question le fonctionnement de l'association. Des décisions seront à prendre et c'est pour cela qu'à l'occasion de la réunion conviviale du 3 décembre 2004 est convoquée une Assemblée Générale Extraordinaire. Ces décisions auront un retentissement pouvant être important sur la vie de l'association, mais espérons-le non vital pour ce qui est de son avenir.

Esperanto 80 est à un tournant de son existence, mais soyons optimistes, les aspects soulevés ci-dessus sont à tempérer. Par exemple, il va falloir point par point aborder les avantages et inconvénients d'une adhésion ou d'une non-adhésion à la Fédération. De même la mise à disposition du poste de président par Jean-Claude ne doit pas forcément être vu d'une manière dramatique. Je vous rassure, Jean-Claude n'a pas envie d'abandonner l'association.

Cyrille

Cyrille

# Esperanta civitanino en Amieno



Ni manĝis kune kaj ŝtopis ventron.

Atentu!  
Mi prenas  
la viandon!

Smac-  
smac

## La Gasta kunveno de la 5a de oktobro 2004

Ni revendu je la 19a horo por aŭskulti Marie-France Conde-Rey, kiun Jean-Claude invitis por, ke ŝi parolu al ni pri la Esperanta Civito.

Ŝin gastigis Jean-Claude kaj Fabienne.

Marie-France komencis paroli pri la Civito, ĝia deveno, ĝia strukturo, ĝiaj estrarano, ktp. Ŝi parolis al ni en Esperanto kaj tradukis en la francan,

ĉar ne ĉiuj ĉeestintoj komprenas Esperanton. Ni uzis dokumentojn, kiuj helpis al ni kompreni la kialon de la estiĝo de tiu nekutima pure Esperanta iamaniere leĝa strukturo.

Estis malfacile ĉiom kompreni, sed ni atenteme aŭskultis la prelegon.

Kelkaj demandis pri tiu afero, sed pri ĝia strukturo kelkaj opinioj ĝin kitikinda.

Poste ni manĝis. Jean-Claude diris kelkajn afablajn vortojn pri Lætitia, kiu post kelkaj tagoj reiros en sian denaskan regionon: la Nord-regionon. Ŝi komencos novan vivon kiel flegistino, ŝia profesio.

Cyrille

Marie-France ŝajnis kontenta pro la akcepto de la grupo.



Ĝis revido!

hikigilo

Lætitia pro baldaŭa translokiĝo norden disdonis **hikigajon**, pardonu... drinkaĵon.

## Morbeko en kelkaj fotoj kaj komentoj

Jen per nur kelkaj fotoj prezenteto de tiu lasta renkontiĝo en Morbecque okazinta la 6a kaj 7a de Novembro 2004.

1 - Venis okdek-anoj kelknombro. Daniel kaj Maryse Devis kun Albert Monti.

2 - Ankaŭ venis sesdek-anino (tamen membrino de **Esperanto 80**). Françoise Lemonnier diskutanta kun Albert (nevidebla) pri la **Borsa Terminaro** en Esperanto, kiu estis disponebla ĉe la libro-servo. Françoise ne ŝatas tian libron, kaj opinias ĝin kontraŭ-Zamenhofeca (diskutinda temo).

3 - Jomo venis kaj kantis dum sabat-vespero. Li daŭrigis la etoson ĝis la 2a horo matene (mi tiam dormis).

4 - Manĝo ĉe tablo inter okdek-anoj kaj ne-okdek-anoj. Bernadette sidas dekstre antaŭ Maryse.

5 - Prelego pri britoj en Bulonjo 1905, pri anglismoj en Esperanto kaj pri neologismoj faris en la ĉambro de la grupo D Terry Page.

6 - Kristin Titgat dum prelego, kiun ŝi faris pri la moroj de rusoj kaj ĝiaj diferencoj kun tiuj de francoj kaj belĝoj (Bernadette preparas ion pri tio).

7 - La libro-servo vendis multajn libro. Kiel kutime troviĝis ankaŭ brokantaĵojn.

8 - Jean-Claude kun Marie-France Conde-Rey. Ŝi venis kun mi kaj Jean-Claude en Morbecque.

9 - Fina kaj kutima foto ĉe la centro de la «base des éclairieurs» (lok-nomo).

Komentoj: Cyrille.



# Événements en pagaille

## Est-ce que Espéranto 80 doit adhérer à la Fédération Espéranto-Nord ?

À la Réunion Conviviale du 3/10/2004 Xavier Dewidehem est venu nous présenter les nouveaux statuts de la Fédération du nord de la France d'Espéranto. La modification majeure est la suivante : auparavant la Fédération était composée uniquement de membres individuels qui adhéraient de leur propre chef à la Fédération. Maintenant les associations, comme la notre peuvent adhérer à la Fédération et tous les membres de l'association adhérant sont automatiquement membre de la Fédération. La Fédération continue également à comprendre des membres individuels adhérant lorsqu'ils ne sont pas déjà membres d'une association adhérente.

## Ĉu klare, ĉu ne ?

À la réunion de Bureau du 26/10/2004, nous avons étudié les statuts de la Fédération nouvelle formule et son règlement intérieur, pour vous faire part de nos réflexions que vous trouverez ci dessous.

1) En préalable nous nous sommes demandé pourquoi diable, alors que nous ne sommes pas des inconnus de la Fédération du Nord ancienne formule, nous n'avons pas été sollicité pour contribuer en amont à un renouveau se voulant aussi important que nous l'a exprimé Xavier ?

2) Les 4 objectifs de la Fédération nouvelle formule :

- Promouvoir la Langue internationale espéranto
- Développer les relations entre les espérantophones des régions Nord-Pas-de-Calais et Picardie
- Soutenir et coordonner les activités des associations adhérentes
- Représenter les régions Nord-Pas-de-Calais et Picardie auprès des instances espérantistes nationales

Nous conviennent parfaitement, mais nous restons sur une grosse réserve : la Fédération ancienne formule, à part le congrès de Boulogne n'a pratiquement jamais mené d'actions fédératives (actions mobilisant l'ensemble des groupes des 2 régions tant dans leur conception que dans leur réalisation). La Fédération nouvelle formule est-elle à la mesure d'un véritable renouveau dans cet état d'esprit ?

3) «La Qualité de membre se perd.....refus de contribuer au fonctionnement..... ». Nous nous sentons spécifiquement visés par ce morceau de phrase, ayant refusé l'an dernier de faire le congrès annuel de la Fédération à Amiens car nous ne pensions pas avoir les forces nécessaires pour mener cette action, même à minima. Cette phrase des statuts nous semble pouvoir être dangereuse.

4) La désignation par le Conseil Fédéral d'un représentant départemental chargé d'assurer la liaison entre les instances fédérales et les associations adhérentes et membres individuels ne nous plaît pas : il nous semble que ce délégué devrait l'être par les membres de la fédération logeant dans un même département. En fait cela donne l'impression de 2 circuits : l'un avec des représentants élus et l'autre avec des représentants désignés???

5) Notre cotisation annuelle passerait de 20 à 30 € par an puisque :

- Nous devrions reverser 10 € par membre adhérent à la Fédération,
- Nous ne pourrions pas baisser notre quote-part de 20 € puisque nos finances sont déjà justes.

6) Que ferions nous avec notre membre à vie qui a payé d'un coup 20 fois la cotisation annuelle l'année de son adhésion ? Nous lui redemanderions chaque

année 10 € ou nous les prendrions en charge ?

7) Que ferions nous de notre principe d'adhésion gratuite de droit à nos élèves de 1<sup>ère</sup> année ? Nous leur demanderions quand-même 10 € ou nous les prendrions en charge ?

8) Si nous avons fini par comprendre le mode de calcul pour qu'aucune association adhérente ne soit sous représentée au sein du Conseil Fédéral, nous ne voyons absolument pas comment va pouvoir être organisé le vote de l'assemblée générale pour pouvoir respecter cet aspect proportionnel.

## Do, nun kion fari ?

### Les enjeux

- Pouvons-nous rester coupés de la Fédération du Nord de la France ?
- Les activités de la Fédération sont-elles suffisamment attractives pour justifier l'engagement financier de chacun et notre engagement dans les actions de cette Fédération ?

### Le Bureau a donc décidé

- De transformer la réunion conviviale du 3/12/04 en Assemblée Générale Extraordinaire pour prendre les décisions nécessaires,
- De lancer lors de cette Assemblée générale le débat quant à ce problème,
- Il nous semble que 4 solutions apparaissent plausibles, mais auront chacune leurs propres conséquences :
  - Adhérer à Espéranto-Nord,
  - Ne pas adhérer à Espéranto-Nord,
  - Adhérer pour 3 ans (temps de vie d'un conseil Fédéral) pour voir et nous repositionner ensuite,
  - Lister les éléments qui doivent être résolus pour entraîner notre adhésion.
- Selon nos décisions précédentes, régler les problèmes de membre à vie et la situation des élèves de 1<sup>ère</sup> année.

Daniel Devis

## Changement de président à Esperanto 80

Lors de l'assemblée générale de notre association le 1<sup>er</sup> octobre, nous avons tenu à accueillir au mieux les « nouveaux » en évitant les côtés administratifs inhérents à toute association. Je souhaite profiter de l'assemblée généra-

le extraordinaire du 3 décembre pour déclarer officiellement ma démission du poste de président. Aussi, si quelqu'un souhaite devenir président, nous pourrions procéder au vote. Si personne ne souhaite se déclarer le 3 décembre, j'accepte d'assurer l'intérim jusque septembre 2005.

Néanmoins une personne devra se présenter **au plus tard en mai 2005** afin d'assurer la continuité de fonctionnement de notre association (préparation de l'année suivante, inscription à AGORA 2005).

Kore kaj amike,

Jean-Claude Roy

# Mallonge – En bref

**Le nouveau Président lituanien choisit comme conseillère en stratégie économique une espérantiste active.**

## **Konsilantino-Esperantisto en Litovio**

En Esperanto: Ekde la 12a de Julio 2004 en Litovio, oficas nova ŝtatprezidento Validas Adamkus. Lia konsilantino pri ekonomia strategio iĝis esperantistino Nijole Zambaite. Perfekte ŝi parolas nian lingvon kaj bone konas Esperanto-movadon. Dum la jarperiodo 1970-1980 ŝi aktivis en junulara Klubo JUNECO. Post sendependiĝo de Litovio ŝi transiris al diplomatia laboro kaj dum kelkaj jaroj laboris en litovia ambasado en Londono, poste de Vaŝingtono. En lastaj jaroj ŝi laboris en ministerio pri eksterlandanaj aferoj de Litovio pri ekonomia startegio.

*El tiritita el Triesta Bulteno Novembro  
Novembro 2004*

**En Corée, l'Espéranto est de nouveau promu sujet d'étude, cette fois-ci à l'université en langues étrangères de Séoul et de Yongin.**

## **Esperanto akceptita de Korea Fremdlingva Universitato!**

En Esperanto: En la 15-a de Novembro 2004, Korea Fremdlingva Universitato, plej fama lingva univ. en Koreio, oficiale akceptis Esperanton kiel lerno-objekton de nova semestro, kiu estos instruota de marto de 2005. La universitato havas du lernejo-terenojn en Seulo kaj Yongin. La alelekto estas tria sukceso en Koreio kadre de universitata kampo sinsekve Univ. Dankook kaj Wonkwang. Nuna prez. de KEA estas Prof. D-ro LEE Youngkoo, kiu estas prof. de ĉinlingva fako de

Korea Fremdlingva Universitato.  
Viaj gratulmesaĝoj estas bonvenigataj.

*El la redakcio de Nun  
la 15-an de novembro 2004*

## **Brusela komunikadcentro vastigas la kampanjon**

En Esperanto: La Brusela Komunikadcentro de Eŭropa Esperanto Unio vastigas sian kampanjon kaj fokusĝas al politikistoj, kiuj kontraŭas Esperanton. **Fokuso: defendo de lingva diverseco** La ĉefa karaktero de la nova, pli vasta kampanjo estas, ke oni komencu la alproksimiĝon per informoj pri defendo de lingva diverseco kaj lingvaj rajtoj, en la nomo de lingvodefendaj grupoj kaj ne de Esperanto-societoj.

*El la redakcio de esperantoland.org  
la 7an de oktobro 2004*

En français: Le «Komunikadcentro» est un groupe bruxellois d'information dont le but est d'informer sur l'espéranto, de promouvoir l'égalité et la diversité linguistique au sein de l'Europe et d'attirer l'attention des journalistes, organisations internationales et nationales sur les problèmes de discrimination linguistique. Il organise régulièrement des rencontres, revues de presses, campagnes, etc. Il a par exemple recensé les propositions d'emploi discriminatoires proposées à Bruxelles exigeant des «Native english-speakers», c'est à dire des anglophones de naissance (voir sur ce sujet : [www.lingvo.org/eo/2/15](http://www.lingvo.org/eo/2/15)).

**La branche catalane d'Indymedia, le collectif international de média-activistes, introduit l'espéranto comme langue de travail pour son site internet.**

## **Indymedia Barcelona enkondukas esperanton**

En Esperanto: Kataluna Esperanto-Asocio sukcesis la enkondukon de esperanto en la novaj-servejoj *Indymedia Barcelona*.

Indymedia estas granda reto prizorgata de grupoj en la tuta mondo kaj organizata per retlistoj kaj asembleoj. La projekto Indymedia naskiĝis okaze de la manifestacioj kontraŭ la kunveno de la Monda Organizaĵo pri Komerco en Seatlo en 1999. La informcentro tie aranĝita funkciis kiel renkontiĝejo, kie ĵurnalistoj povis trovi informojn kaj/aŭ publikigi siajn proprajn. Retadreso: [http://barcelona.indymedia.org/?lang=eo\\_EO](http://barcelona.indymedia.org/?lang=eo_EO)

*El la ttt-ejo de Kataluna Esperanto-Asocio  
la 26an de oktobro 2004*

**OpenOffice la suite bureautique gratuite issue du logiciel libre se met à l'espéranto.**



**OpenOffice.org malfermiĝas al esperantistoj**

En Esperanto: Senpaga ampleksa vortprialaborilo kaj multo alia, tute en Esperanto. Post kelkaj monatoj tio povas realiĝi. Jam en 2001 esperantistoj faris la unuajn iniciatojn, kaj pli ol jaron teamo de volontuloj laboras por esperantigi la ampleksan liberan programaron kun la nomo *OpenOffice.org*. Nun la laboro ricevis oficialan rekonon de la internacia teamo de *OpenOffice.org*, kaj en la oficiala paĝaro de la organizaĵo aperis ankaŭ sekcio pri la esperantiga projekto.

Ret-adreso: <http://eo.openoffice.org/>  
*El [www.liberafolio.org](http://www.liberafolio.org)  
la 25an de oktobro 2004*

# Dankojn el amikoj – Remerciements d'amis

Tiujn ĉi gratul- kaj dank-mesaĝojn oni ricevis de amikoj, kiuj ankaŭ ricevas «Okdek-anoj ĉe l' Papero».

*Cyrille*

## **El Italio**

Tre estimata! Daŭre mi ricevas vian revuon, sed ŝajnas al mi, ke de tempo al tempo bonas ke leganto atestu pri ties legado: nu, ĉi tiu estas la kialo de mia mesaĝo, nur danki vin pro la sendado kaj gratuli pro la interesa enhavo,

rezultanta el vere vigla aktivado de la grupo. Estis aparte interesa la ekscio pri prelego de s-ro Daniel Moirand, kies tradukitan libron «La libro de mirindaĵoj de Marco Polo» mi ricevis donace antaŭ kelkaj semajnoj. Plej korajn salutojn kaj sukcesoplenan laboron deziras Elda Doerfler.

## **El Japanio**

Cyrille, Dankon pro la sendo. Mi estas ĝoja sciante la aferojn en Amie-

no. B.v. transdonu salutojn al ĉiuj ke mi fartas bone kaj lastatempe mi estas okupita pro la nova laboro en ŝipkompanio. Sincere, Karibe.

## **El Italio**

Estimata Cyrille, Koran dankon por Via gazeto, kiu mi volonte legas. Mi plimultigas ĉiun numeron kaj disdonas al miaj samideanoj. Ni deziras al Vi sukceson en Via bela laboro. Amike, Aŭdrone.